

This document is merely a consolidation of the five preceding documents.

Please see those individual documents for the Esperanto phrases and/or their English translations.

KURSETO PRI ESPERANTO

1-KONVERSACIO

Saluton!

Bonan tagon!

Bonan matenon!

Bonan vesperon!

Bonan nokton!

Mi deziras al vi bonan nokton!

Mia nomo estas Karlo.

Mi nomiĝas Karlo.

Kiel vi fartas?

Ĉu vi fartas bone?

Mi fartas bone, kaj vi?

Mi loĝas en urbo Berlino.

Mi loĝas en urbeto Herzberg.

Mia urbo nomiĝas Osaka.

Mi loĝas en vilaĝo Broc.

Mi loĝas en lando Francio.

Mi loĝas en Senegalio.

Mia lando nomiĝas Japanio.

Kie vi loĝas?

Mi lernis Esperanton en la jaro 2010.

Kiam vi lernis Esperanton? En kiu jaro?

Mi lernis per la kurso XY

Mi lernis sola. Kaj vi?
Mi lernis en kurso en mia urbo.
Mi lernis per legado de lernolibroj.
Mi lernis per kurso en mia poŝtelefono.
Kiel vi lernis la lingvon?

© MIR jan 2017

2-KONSTRUADO DE VORTOJ

PENSU PRI BRIKOJ!!

1. Sam-urb-an-o
2. Sam-vilaĝ-an-o
3. Sam-klas-an-o
4. Sam-land-an-o
5. Sam-religi-an-o
6. Sametaĝano
7. Samideano
8. Malsamideano
9. Samlingvano

Ĉiu apogas sin sur sia denaska lingvo

Tamen en Esperanto oni povas diri ideojn, por kiuj mankas vortoj en la denaska lingvo.

Kun franclingvanoj provu laborigi ilin, ke ili divenu 1 concitoyen, 2 camarade de classe, 4 compatriote, 5 coreligionnaire, 6 voisin de palier.
Kun germanlingvanoj provu laborigi ilin, ke ili divenu 7 Gleichgesinnte.

Provu **trovi la signifon** de

Ne-venk-ebl-a majstro de aikido

Ek-al-u!

Farendaĵoj

Malprokrasteblaĵoj

Sunokulvitroj
Entraĵniĝo je la 22:45
Bebvartistino
Leĝo kontraŭ provbestomisuzado
Lertigejo por kamparanoj

© MIR jan 2017

3-Manieroj diri la samon

1. La pordo de la domo
2. La dom-pordo
3. La dompordo
4. La domopordo
5. La domo-pordo
6. La doma pordo
7. La pordo doma

7 manieroj diri la samon.

Germanlingvano konstato, ke la formo 3 similas al la formo en sia lingvo.
Franclingvano konstato, ke la formo 1 similas al la formo en sia lingvo.

Ktp

Granda elekteleco

Do ĉiu persono en la mondo povas apogi sin sur unu el tiuj multaj ebloj.
Oni povas supozi, ke tiu persono, estante komencanto, parolos en Esperanto per formoj proksimaj ĉe sia denaska lingvo.
Oni konstato, ke kiam la persono progresas, li aŭ ŝi kuraĝas krei novajn formojn, improvizi.

Ekzemplo

fr: ça n'a pas d'importance. de: Das spielt keine Rolle. en: it does not matter.

En Esperanto??

Tio ne gravas. Tio ne ludas rolon. Tio estas detalo.

4- KONJUGADO: IS-AS-OS

Hieraŭ mi laboris.

Hodiaŭ mi ripozas.

Morgaŭ mi ekskursos.

Hieraŭ pluvis.

Hodiaŭ neĝas.

Morgaŭ sunos.

Pasinteco: -is

Mia aŭto paneis.

fr: ma voiture est tombée en panne / ma voiture tomba en panne / ma voiture tombait en panne.

de: mein Auto hat eine Panne gehabt / mein Auto hatte eine Panne.

en: my car was out of order / my car has been out of order.

Mi estis manĝinta. (participo aktiva)

La laboro estas farita. (participo pasiva)

-i por la ideo de pasinteco.

Nuntempo: -as

Mi laboras.

La Tero estas ronda.

Kiu estas nun parolanta? (participo aktiva)

Kio estas planata por morgaŭ? (participo pasiva)

-a por la ideo de nuno

Futuro: -os

Kiam vi komprenos??

Infano estas komprenonta. (participo aktiva)

Jen listo de farotaj aferoj. (participo pasiva)

-o por la ideo de futuro

© MIR jan 2017

5-Genroj, ido kaj loko de bestoj

HUNDO			
Virhundo	Hundino	Hundido	Hundejo
KATO			
Virkato	Katino	Katido	Katejo
BOVO			
Virbovo	Bovino	Bovido	Bovejo
KASTORO			
Virkastoro	Kastorino	Kastorido	kastorejo
ĜIRAFO			
Virĝirafo	Ĝirafino	Ĝirafido	Ĝirafejo
KOLOMBO			
Virkolombo	Kolombino	Kolombido	Kolombejo
...			
...

Por hundo, kato kaj bovo oni povas supozi, ke ĉiu lingvo havas vortojn por la 4 ĉeloj, genroj, ido kaj loko.

Por la aliaj ne tiom oftaj bestoj mankas precizaj vortoj en aliaj lingvoj ol Esperanto. Do la tabelo havas malplenajn ĉelojn.

Imagu, ke post 15minuta (?) lernado de Esperanto **vi povas kompreni kaj diri** vortojn, kiuj **NE EKZISTAS** en via denaska lingvo!!

Jen la miraklo de ESPERANTO!!

Lernante Esperanton oni pli uzas sian deduktkapablon ol sian memorkapablon. La memorkapablo malkreskas ekde la aĝo de 6. La deduktkapablo restas tra la tuta vivo.

© MIR jan 2017